


LA JUNIA VOJO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

SUR LA VOJO AL MONDLINGVO.

En la estintaj tempoj turka monarko provis esplori la „pralingvon” de la homaro, tiun, kiu estis parolata de la unuaj homoj de nia planedo. Li ordonis por sia eksperimento, ke oni forprenu nombron da unujaraj infanoj de siaj patrinoj ka, ke la infanoj estu edukataj de mutaj helpistoj. Tiel okazis. La infanoj kreskis, neniam aŭdante eĉ unu sonon de la homa lingvo.

La imperiestro estis scivola, kiun lingvon tiuj kreaĵoj parolos. Sed — la infanoj restis mutaj kaj nur kelkfoje blekis kaj kriaĉis, per tio sciigante, ke ili posedas voĉon, kiu nur bezonas la gvidadon de instruisto.

Tiu saĝa reganto de Turkujo ne fariĝis pli prudenta per sia eksperimento. Ĉu vere ne? Li nun sciis, ke la lingvoj de la homaro evoluis dum tempoj. El sonoj similaj al krioj de bestoj eble la nunaj kulturlingvoj evoluis.

Kion la monarko eble meditis pri tiu problemo? Li eble pensis en sia saĝeco: Kial ni havas tiom da diversaj lingvoj, kiuj la homaron ne kunigis, sed disigis?

Jam de longe la saĝa kapo de tiu reganto de la Turkoj ripozas

de siaj zorgoj. Sed niaj zorgoj fariĝis pli grandaj kaj pli gravaj. Tiu filo de la Turkoj vekis en tiuj pasintaj tempoj la ideon de tiu granda amiko de la homaro, de la kreinto de la geniala mondhelplingvo Esperanto, d-ro L. L. Zamenhof.

Ni ne trovis iun sciigon pri la pralingvo. Kaj ni ne plu serĉas ĝin. Sed hodiaŭ estas pli necese ol iam forigi la multajn limojn, kiujn la lingva diverseco konstruas ĉirkaŭ la diversaj ŝtatoj. Ni devas trovi universalan lingvon, kiu taŭgas por ĉiuj homoj de la mondo por facila interkompreniĝo, flanke de la ge-patra lingvo. Esperanto, la verko de d-ro Zamenhof, havas inter ĉiuj konstruitaj helplingvoj la plej bonan ŝancon venki kiel sola mondlingvo.

Wolfgang Baranowsky, Germanujo.

LA JUNULOJ ANTAŬ LA VIVO.

Iom pripensante la aferon, ja ne estas belega perspektivo, kiun la vivo oferas al ni, junuloj.

Kiam, post la dolĉaj revoj de nia infanaĝo, ni subite staras antaŭ la Vivo, ni trovas ĝin tre malsimila al tio, kion ni antaŭvidis.

Multajn demandojn oni faras al ni dum la jaroj de nia plej frua juneco, sed precipe ĉi tiujn: „Kion vi faros en la estonteco? Kiun vojon vi elektos por la marŝado tra la vivo? Ĉu vi studos? Ĉu vi estos profesoro, advokato, inĝeniero, ...? Aŭ ĉi vi preferos negoci, komercvojaĝi, fabriki ...? Ĉu vi laboros en fabriko, ĉu vi havos privatan oficejon aŭ ĉu vi fariĝos aviadisto? Kion vi faros?”

Kiam mi vidas virojn 30- aŭ 40-jaraĝajn kiuj de sia junaĝo konstante kaj senlace iradas ĉiutage al oficejo, fabriko aŭ iu ajn ejo, mi teruriĝas. Ĉu eblas vivi, se oni scias, kion oni faros morgaŭ, postmorgaŭ, la sekvontan tagon ... k.t.p.? Mi ne komprenas tion. Se ni akceptos tiun vojon, ni jam scias, kiel ni vivos: unue ni putros dum nia juneco, studante en gimnazio kaj laborante en la liberaj horoj por helpi plialtigi la hejmajn enspezojn. Poste ni trovos kunulinon, kiu al ni plaĉas kaj ni geedziĝos. Ni havos dek tri infanojn, kiuj ĉiutage ploros kaj petos panon, vestaĵojn k.t.p. Tial ni devos labori tuttage. Ni laboros de la oka aŭ naŭa horo matene ĝis la tagmezo; tiam ni manĝos kaj ree laboros de la tria ĝis la sepa. Poste ni iros hejmen, legos gazetojn, vespermanĝos kaj enlitiĝos (se la ekonomiaj malfacilaĵoj ne devigas nin fari eksterordinarajn laborojn). La sekvontan tagon simile, la sekvontan kaj la sekvontan ... k.t.p. Dum la festotagoj ni promenos aŭ iros al kino kaj nur tio modifos la ĉiaman uniformecon de nia vivo. Ni iĝos malŝatindaj burĝoj, havos multegan grasaĉon kaj ampleksan

ventron. Ni amos la ordon kaj tradicion. Ĉio en nia vivo estos malgranda: malgrandaj niaj ĝojoj, malgrandaj niaj suferoj kaj malgranda nia ambicio; kaj por iomete plibeligi nian vivon ni havos etajn maniojn, ekzemple ni kolektos poŝtmarkojn, fumos pipon aŭ estos piedpilkamatoroj — Kaj tiel, en tiom malloganta medio, ni maljuniĝos, ni havos malsanojn kaj dolorojn kaj finfine mortos. Kaj nun mi demandas: „Ĉu tio estas vivi?”

Laŭ mia opinio la vivo estas aro da sensacioj kaj ju pli intensa estas la ekzistado de unu ulo, des pli diversaj estas tiuj, kiujn li perceptas. Aŭ, alie, vivi estas ŝanĝi; ne-ŝanĝi estas vegeti kaj kion vi preferas: vivi aŭ vegeti?

Male, la junulinoj ĝenerale ne havas tiajn problemojn, ĉar ilia vojo jam estas antaŭsignita de la homoj. En la nuna sociordo la virina kariero nepre estas la edziniĝo (ni preterrigardu kelkajn laŭdindajn, sed malmultnombrajn esceptojn) kaj ju pli inteligenta estas ino, des pli bone ŝi atingas tiun celon. Kontraŭe, ni viroj pro la rajto de elektado povas trakti tiun problemon pli senzorge. Ni ĉiutempe povas trovi nian kunulinon, ĉar, se nia unue elektita ne ŝatas nin, ni estas certaj, ke la dua aŭ la dekkvina pensos alie. Kaj ni fine trovos virinon, se ni tion deziras, ĉar ja necesas kuraĝego por deziri tion (pro la manko de loĝejoj ... !!?).

Tio estas, laŭ mi, unu el la plej gravaj diferencoj inter la du seksoj kaj kaŭzas la malsimilan konduton kontraŭ la ĉiutagaj problemoj.

Evidente, mi parolas laŭ mia vidpunkto, tio estas laŭ la hispana vivmaniero, la sola kiun mi konas. Tial mi tre ĝojus scii pri tiuj situacioj en landoj, kie ili estas malsamaj, kvankam mi dubas pri tiu ebleco, almenaŭ ĉe la blankrasaj popoloj.

J. Luis Ballesteros, Hispanujo.

Noto de la redakcio: Ĉu la verkinto ne estas iom pesimisma? Multe ni esperas, ke aliaj junuloj respondu pri lia verkaĵo, precipe ankaŭ la inoj! Volonte ni en la venontaj n-roj de LJV donos iom da spaco por viaj respondoj! Skribu al Red. „La Juna Vivo”, TJO-Centro, West-Graftdijk, Nederlando.

POŝTMARKRUBRIKO.

Ĉi tiun fojon Henny Hamer (Ned.), J. G. Teare (Angl.), Georg Stumpfegger (Germ.) kaj B. J. Anjer (Norv.) sendis poŝtmarkojn. Ni tutkore dankas ilin kaj esperas, ke ili jam ricevis niajn ekzemplerojn.

Koran dankon pro liaj poŝtmarkoj ankaŭ al amiko Schaedel, fantomo el Konstanz. Nun estos mia vico, amiko Sch.; en Harlemo vi dormos eĉ ne unu horon: mia fantomo ŝvebos ĉirkaŭ via lito. La venĝo estos dolĉa! (C. G.)

De alia fantomino mi ricevis koran leteron. Ankaŭ ŝi promesis denove fantomi ĉirkaŭ mia lito.

Mi scias nur unu aferon: Harlemo volas superi Konstanz. Ĉu ni renkontos multajn filatelistojn? Ĝis revido, sed — rapidu!

Libro-Servo, Edamo, Ned.

Himno de la Eŭropa Junularo.

(Teksto kaj melodio de Carl Fohr, traduko de J. F. Berger).



1. Po-po-loj eŭ-ro-paj, ni kres - ki de - zi-ras. Ku-
2. So - pi - ras po-po-loj la pa - con, li - be - ron, La-
3. An - taŭ - en, ju - nu - loj, ek - fla - gras la fla - mo Mon-




1. ra - ĝe ni ve - nas kun pu - ra la kor'. La
2. bo - ron ho - min - dan su - fi - ĉa kun pan'. Sen-
3. tran - ta la vo - jon al be - la e - pok'. En



1. pa - con e - ter - nan ni ar - de as - pi - ras, O-
2. i - gi ni vo - las je lar - moj la te - ron. Tro
3. ko - roj sen - nom - braj ek - bru - las la a - mo. Jen




1. fe - roj de vi - vo kaj sang' res - tu for!)
2. mul - tajn eks - ter - mis del' Mort, kru - da man'.) Ni sta - ras ko-
3. pre - taj ni sta - ras por pa - ca al - vok'.)



mu - ne en tu - ta la mon - do, A - mi - kon nur vi - das



en la naj - bar', Tam - bu - roj mu - ti - ĝas en ni - a lig-



kon - do, Al al - ta la cel' mar - ŝas iu - na ho - mar'

Beneluksa Kongreso, t.e. la 18-a kongreso de L.E.E.N. (Nederlando) kaj la 16-a Kongreso de F.I.L.E. (Belgujo), okazos dum Pentekosto (12-a-14-a de majo) en Hilversum, Nederlando, Kongresejo: Hotelo „Santbergen“, Noorderstr. 2, Sekretariino: S. Visser, Galilëistr. 42, Hilversum. Kotizo: 3 guld; post la 1-a de marto 3,25 guld, post la 15-a de aprilo 3,75 guld. Por unutaga partopreno respektive guld., 1,75 kaj 2 guld.



**7-a Internacia
Junular-Kunveno
en Haarlem, Nederlando
(26/7—2/8 1951)**
Adr. Organiza Komitato:
M. Tinxgracht 10, Edam,
Nederlando.

Ni ricevis aliĝilojn el Germanujo, Anglujo, Jugoslavujo, Nederlando kaj Francujo. Kie restas Danujo, Svedujo, Belgujo, ktp?

Belegajn ekskursojn ni anoncis, vizitojn al la Ysellago kaj Norda Maro.

La vizito al la mondfama Volendam, kun la granda festvespero en Edamo, estos surprizo por vi! Ĉu vi deziras scii ion pri tiu pentrinda vilaĝo? Jen do:

La nomo Volendam fakte signifas: „plena akvoĉaro”.

En la 14-a aŭ 15-a jarcento kelkaj fiŝistoj ekloĝis ĉe la akvoĉaro de la Ye, apud la vilaĝeto Yedam, poste Edam.

Malmulte tiuj fiŝistoj konjektis, ke fakte ili fondas poste tiom faman vilaĝon!



La 20an de novembro 1437-a, Grafo Vilhelmo la Kvina permesis al la Yedamanoj fari propran havenon. Tiam la kluzo, ĉe la enfluejo de la Ye, fariĝis superflua kaj la kluzgolfeto fariĝis

„plena” (Nederlandlingve: „vol”). Jen do kiel estiĝis la nomo Volendam.

Granda urbo ĝi neniam fariĝis, sed en sia glora tempo la Volendama fiŝistŝiparo enhavis proksimume 300 „velojn”. Nun ĝi estas malpli granda, pro la sekigo de la „Suda Maro”.

Sed ankore la Volendamanoj restis fiŝistoj. „Sentimaj piratoj de la Suda Maro” ja estas ilia kromnomo. Kvankam kelkaj elektis alian metion, multaj nun fiŝas (en pli grandaj ŝipoj) sur la Norda Maro.

Pentristoj el ĉiuj partoj de la mondo verkis en Volendam kaj tiel fakte la Arto reklamis ĝin kaj kaŭzis, ke la simpla fiŝista vilaĝo tiras al si tiom da miloj da vizitantoj.


Ĉu ankaŭ vin?

Geamikoj, vi multe helpas en la organizado, se vi frue anoncas vin!

La britaj partoprenontoj bonvolu tuj interrilati kun la brita ĉefperantino, F-ino N. Rees, Seven Sisters nr. Neath, S. Wales, por formi karavanon al la IJK.

Pluraj jam informiĝis, ĉu ili povos resti duan semajnon en Nederlando. Ni nun sciigas, ke ni organizos postkongreson en la bela regiono „t Gooi”, en la sudorienta parto de Nord-Holando. Oni tie loĝos en kampdomo kaj tendo. La ĉirkaŭaĵo estas belega kaj taŭga por fari promenadojn. Ni i.a. planas viziton al Hilversum. (Se eble ni tie vizitos radio-studion). La plenaj kostoj estos maksimume 25 guldenoj. Sed — kiu deziras partopreni tiun kunvenon, tuj anoncu sin, ĉar ni jam nun devos mendi lokojn en la kampdomo. Do — rapidu, ni petas. Por la dua semajno oni anoncu sin al T.J.O.-Centro, West-Graftdijk, Nederlando.

SKOLTA RUBRIKO.



La 7-a Tutmonda jamboreo okazos en Bad Ischl (distrikto Salzkammergut, Aŭstrujo) de la 3-a ĝis la 13-a de aŭgusto. Ĝin partoprenos maksimume 15.000 skoltoj.

Oni jam planis parton de la programo kaj projektis ĉi tiun aranĝon: la 3-an de aŭgusto: solena malfermo; la 5-an de aŭg. (dimanĉon): diservoj; la 6-an de aŭg. la aŭstra registaro akceptos la partoprenantojn; nokte okazos tendara fajro; la 9-an de aŭg. kunsidos la instruantoj

de Gilwell Park (internacia lernkampadejo) kaj la diplomitaj estroj de tiu kampadejo; la 13-an de aŭg, oni fermos la jamboreon je la dek unua horo matene.

Esperantistaj geskoltoj, ne forgesu kunporti propagandilojn! Larĝe uzu nian lingvon!

Ĉeĥoslovakujo: Skoltfrato Voldrich promesis, ke antaŭ la fino de la jaro 1950-a li estos gajninta dudek kvin esperantistajn skoltojn. Li plenumis sian promeson jam en oktobro. Imitinda ekzemplo!

Belgujo: Oni sukcesis presigi porskoltajn propagandajn folietojn.

Zigzaganta Hipopotamo.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Nederlando.*)

La estraro havis sian unuan kunvenon en la nova jaro la 7-an de januaro.

Oni kunmetis komitaton, kies anoj estas respondecaj pri la diversaj aranĝoj por la IJK.

„La Peranto inter la Perantoj” ne plu aperos. Ne sufiĉe da interesiĝo ĉe la legantoj kaj manko de mono igis nin ĉesigi la eldonadon.

La estraro ricevis inviton el Jugoslavujo por viziti tiun landon dum la somero. Kvankam ni ne povas

akcepti tiun ĉi inviton, ni dankas ankaŭ en ĉi tiu loko al niaj samideanoj pro la afabla gesto.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Belgujo: S-ro Ph. Cullus, 22-j. instruisto, sindikatestrarano, 13 rue Chopin, Bruxelles, dez. kor. k. geinstruistoj el ĉ. l., pr. sindikatanoj.

Britujo: Arthur Battersby, 67 Hynd Burn Rd., Accrington, Lancs. (19-jara) dez. kor. kun knabinoj, prefere en Italujo. Intereso pri bildkartoj.

Internaciema anaro de Protestanta Dimanĉlernejo dez. kor. k. anaroj de dimanĉlernejoj k. preĝejoj en l. t. m. S-ro E. Revill, 13 Highbank Drive, Manchester 20.

Ĉeĥoslovakujo: Junaj sportuloj dez. interŝ. sportinsignojn, -flagetojn ktp. Jaroslav Matula, Jihlava, Srázná 8.

Danujo: „Juna Volo” (15 geknaboj, 15-25-j.) organizos letervesperon je la 16-a de marto. Ili dez. kor. k. l. t. Adr.: Birgit Hviid, Iver Huitfeldtsgade 57^t, Aarhus.

Francujo: 20 lernantoj de Moderna Kolegio dez. kor. k. gestudentoj en l. t.m. (aĝo 13-19-j.), interŝ. pk., pm., geografiajn dokumentojn, ktp. „La Verda Klubeto, Collège Turgot, 69 rue de Turbigo, Paris 10.

17-j. pariza seminariano dez. kor. kun alilandaj estontaj geinstruistoj pri la organizo de porinstruistaj lernejoj. M. Duc Goninaz, E.N.I., 10 rue Malitor, Paris XVI.

Hispanujo: Kiu propagandcele sendas al mi Esp. poŝtstampojn interŝanĝe ricevos hisp. pm. aŭ -stampojn. Ramon Molera, Hospital 13, Moyá, (Barna).

Japanujo: S-ro Shojiro Kawaguchi, instruisto en teknika supera lernejo, dez. kor. k. l. t. m. Adr.: 15, 3-cho, Asakayamacho, Sakai-City, Osaka.

Ŝatou Sigeru, 15-jara lernanto, dez. kor. k. geesperantistoj en la tuta mondo.
Adr.: 1-5 Tomisaka, Bunkjo-ku, Tokio.

Jugoslavujo: Junulara Esp.-grupo aranĝos letervesperon en la fino de marto
'51. Skribu multe; resp. certa. Adr.: Božić Ivan, Kranj, Gasilski trg. 1.

Nederlando: Bart C. Elskamp, Vaartweg 50, Smilde (Dr.), 44-j. instruisto,
dez. kor. kun francaj kaj danaj Esperantistoj.

Usono: S-ro Robert Alberg, Eastern Jr. High School, Lynn, Mass., instruisto,
deziras korespondi.

VERDLANDO VOKAS.

Listo de radio-disaŭdigoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj.

Tempindiko laŭ M.E.T. (= mezeŭropa tempo).

Mallongigoj: I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso. M = muziko.


Dimanĉe	17.00—17.20	Romo, 19,5 m, 31,1 m: I kaj M.
Lunde	6.30— 6.35	Vieno, 25 m, 30 m, 41 m, 48 m, 513 m: I.
	8.15— 8.30	Stokholmo, 19,80 m, 49,46 m: I.
	8.45— 9.00	Rijssel (Lille), 235 m: P.
	15.30—16.00	Rio de Janeiro, 30,71 m, 375 m: K.
	16.15—16.30	Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I.
	23.15—23.20	Hilversumo I, 402 m, V.A.R.A.: I. (Nur ĉiudusemajne: 8/1/1951 k.t.p.).
Marde	2.15— 2.30	Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I.
	12.55—13.00	Berno, 13,94 m, 31,46 m, 48,66 m: P. de d-ro Arthur Baur.
	18.40—18.45	Berno, 19,60 m, 31,46 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza elsendo.
Merkrede	0.45— 1.00	Gvatemalo, 49 m: I.
Ĵaŭde	9.30— 9.45	Parizo, 48,39 m, 347 m: K.
	12.55—13.00	Berno, 13,94 m, 31,46 m, 48,66 m: P. de d-ro Edmond Privat pri mond-federacio kaj mond-paco.
	18.10—18.25	Vieno, 25 m, 30 m, 41 m, 48 m, 203 m: P. (Nur ĉiudusemajne).
	18.40—18.45	Berno, 19,60 m, 31,46 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza disaŭdigo.
Vendrede	17.00—17.20	Romo, 19,5 m, 31,1 m: I kaj M.
	18.15—18.30	Hilversumo II, 298 m: P. (Nur unufoje en du monatoj).
Sabate	20.00—20.15	Sofio, 39,11 m: I kaj P.
	23.15—23.20	Hilversumo II, 298 m: I.

Informoj kaj petoj:

Feliĉan novan jaron! — Dankante pro la kartoj kaj bonaj deziroj, kiujn mi ricevis de pluraj legantoj de ĉi tiu rubriko, mi deziras al ĉiuj feliĉon, prosperon kaj agrablan Esperanto-radio-aŭskultadon en la nova jaro!

B.v. sendi ĉiujn informojn pri radio al: S. S. de JONG Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Terkwerd (Fr.), Nederlando.

LA JUNA VIVO



MONATA ORGANO POR LERNEJANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-BRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 * JARKOTIZO 1.- NED. BULD. AŬ EGALVALORO

La legendo de Volendamo.

En la proksimeco de Volendamo, apud la maro staris sur monteto malgranda kaduka dometo. La tegmento estis el branĉetoj kaj pajlo. La truojn en la muroj oni plenigis per argilo kaj musko.

Dum la printempo la maro penetris en la landon. Ankoraŭ ne estis digoj.

Tiam la monteto iĝis insuleto kontraŭ kiu la ondoj muĝis.

En la dometo loĝis Karlo, la patro, kaj Mario, la filino. Karlo senlace devis labori por gajni panon por si kaj por la filino.

Somere li falĉis la herbon, helpis la kamparanojn, do li ĉiam estis diligenta.


Vintre li ne havis laboron, kaj mizero venis en la dometon sur la monteto.

Malgranda Mario estis gaja knabino kun blondaj haroj kaj belaj, bluaj okuloj. Kvankam ŝi ankoraŭ estis juna, ŝi estis lerta kiel plenkreskulino. La dometo ĉiam estis purega, ŝi donis nutraĵon al la anasoj kaj la kokinoj kaj ofte disŝutis panerojn por la birdoj.

Kiam ŝia tasko estis preta, ŝi volonte vagis laŭlonge de la maro.

Iam ŝi vagis malproksime de sia domo, kaj preskaŭ perdis la vojon. Feliĉe la maro montris al ŝi la vojon. Sed mallumiĝis, kaj la vento ekfortiĝis. La vojo, sur kiu ŝi devis promeni returne, subakviĝis.





Mario ekploris, kaj kuris kiel eble plej rapide. Ŝi kriis laŭte, kaj estis senespera.

Ondego proksimiĝis kaj ... el ĝi venis ĉevalido. La kapo de la besto estis kovrita per ŝaŭmo.

La tima knabino prenis la kolharojn de la ĉevalido kaj rapide ĝi portis la knabinon tra la ondoj al ŝia dometo, al

ŝia maltrankvila patro. Subite malaperis la ĉevalido.

La venontan tagon la vetero pliboniĝis kaj ĉiuj aŭdis pri la mirinda savo de Mario.

Mario mem estis ĝoja, sed ofte rigardis al la maro. Kie restis la ĉevalido?

Monatoj kaj jaroj pasis, sed Mario ne povis forgesi sian ĉevalidon. Ofte ŝi sidis malantaŭ la fenestro kaj ŝi longe rigardis al la maro. Ŝi sopiris denove renkonti, almenaŭ unufoje, sian savinton.

Post kelkaj jaroj la sopiro pligrandiĝis kaj pligrandiĝis. Preskaŭ tro! Mario ne plu povis labori. La dometo malpuriĝis. Mario estis malsana! Ŝi nur fikse rigardis al la maro.

Sed iam ĝi revenis, la ĉevalido. Ĝi tiam estis bela ĉevalo. Ĝi gaje henis. La knabino kuris el la dometo, prenis la kolharojn de sia amiko.

La ĉevalo kuris al la maro, saltis en la ondojn kaj ili ambaŭ malaperis.

Senparole staris la laboristoj kaj la patro de la knabino.

Post kelkaj minutoj oni saltis en la boatojn kaj remis, kaj serĉis, sed ili trovis nenion kaj nenion.

Kompatinda patro, kompatindaj amikoj.

Ili uzis retojn por serĉi sur la fundo de la maro. Ili nur kaptis fiŝojn, multe da fiŝoj.

Mario estis kaj restis for. Sed la kamparanoj ĉiujn tagojn kaptis fiŝojn, ili ne plu volis labori sur la tero, kaj de post tiuj tagoj, la Volendamanoj estas fiŝkaptistoj kaj en la blazono de la vilaĝo ĝis hodiaŭ staras la ĉevalido, sen Mario.

el la lerneja gazeto de la gelernantoj de la Edama lernejo, Nederlando.

Postskribo: Volendamo estas la mondkonata vilaĝo apud la IJsellago, kaj parto de la komunumo Edamo.

La Aventuro de Frederiko




REDERIKO ŝipveturis per sia
boato sur la lago.

Subite li miris: li kaptis la sunon.

Kion vi faras tie, suno?

Mi falis, ĉar mi turniĝis tro rapide.




4

Frederiko prenis ĝin je la fino de unu el ĝiaj radioj; ĝi estis peza.

Li metis ĝin en sian boaton. Ĝi estis varma, sed Frederiko estis kontenta.

Li estis kontenta, ĉar de nun li ne plu bezonos ombrelon, nek mantelon, nek fornon, nek litkruçon.

Li estis kontenta, ĉar li ĉiam havos belan veteron ĉe si.



Li povos kunpreni la sunon, kiam li vojaĝos: per aŭtomobilo, per vagonaro, per aŭtobuso.

Li povos kunpreni ĝin, kiam li iros al la montaro, al la kavo.

Kiam li estos malsana, li povos meti la sunon antaŭ sian liton.

Tion li diris en sia boato, Frederiko.

Kaj li estis kontenta.



Venu al mi, suno!

Ne, mi devas iri returne en mian ĉielon.

Kial?

Ĉar mi devas esti en la ĉielo por

la tuta mondo:
 por la floroj,
 por la herbo,
 por la limakoj,
 por la malgrandaj infanoj,
 por la kokidoj,
 por la ranoj,
 kiuj ĉin bezonas min.



Nun ĝi tre varmigas la boaton.


Frederiko ŝvitis: la ŝvito fluis sur liaj vangoj, kvazaŭ li ploris.
 Frederiko vidis, ke liaj ŝuoj ekbrulas; li metis siajn piedojn en
 la akvon.

Nun la ligno ekflamis, ĉie estis fajreroj.

Frederiko ekrostis.

Li prenis la sunon je la radioj kaj jetis ĝin en la akvon.


Jen la akvo komencis
 boli; ĝi boligis ĉion ĉirkaŭ
 la boato. Ĝi boligis la fiŝojn.
 Oni povas manĝi ilin.




.....
.....
Tiam, Frederiko ne plu volis gardi la sunon. Li metis ĝin en vojaĝan botelon kun la akvo kaj, per sia flugmaŝino, li rapide retransportis ĝin al la ĉielo.

Kaj nun
la suno turniĝas
denove
kare
kiel decas
en la alteco

La infanoj de la
Collège de Prélaz,
L A U S A N N E,
kaj ilia instruistino.



La krabo.



Oni multe trovas ĝin, kiam estas ventego. Ĝi defendas sin per siaj pinĉiloj. Ĝia nutraĵo estas malgrandaj marbestoj, kiujn ili portas al la buŝo per siaj pinĉiloj.

Ankaŭ la homoj manĝas ĝin. Vivante ĝi estas griza, sed se oni boligas ĝin, ĝi iĝas ruĝeta.

Estas du specoj: la naĝkrabo, paguro, kiu havas naĝilojn al la malantaŭaj kruroj, kaj la landkrabo, kankro, kiun oni povas trovi sur la marbordo, dum refluo.

Ĝi kaŝas sin sub la sablon, kaj ĝi mordas, kiam oni tuŝas ĝin.

Ĉiun jaron ĝi perdas sian konkon, kaj formas novan per la kalko el la akvo.

Camille 6a jaro,

Home Normandy „De Panne”, Belgujo.

Krucvort-enigmo.

Desegnu kvadraton el tridek ses (36) ĉeloj. Metu ĉe la ĉeloj de la supra flanko la literojn A, B, C, D, E, F. Ĉe la maldekstra flanko (de supre malsupren) vi metu la ciferojn 1, 2, 3, 4, 5, 6.

(r) signifas, ke oni nur skribu la radikon de la vorto.

Indikiloj horizontalaj: IA-IF: Kion ĉiuj timas; 2A-2F: dekpieda markrustulo; 3B-3D: knabina ludilo (r); 4A-4D: spirebla gaso; 5A-5E: renkonti post ŝerco; 6B-6F: malinteligentulo (r); 3E-3F: pronomo; 4E-4F: prepozicio.

Indikiloj vertikalaj: A1-A6: parto de la jaro; B1-B6: granda regno(r); C1-C5: Ĉiamverda arbeto; D1-D2: moviĝi de loko al loko (r); D3-D6: esti kapabla; F1-F5: fortranĉi la harojn; F1-F6: kie la suno leviĝas (r).

Sendu vian solvon antaŭ la 15-a de aprilo al: s-ro T. K. Slade, 7 Southview Rd., Southampton, Anglujo.

Usono: Lernantoj 13-15-j. dez. kor. kun samaĝuloj. Skribu al: S-ro Robert Alberg, teacher, Eastern Jr. High School, Lynn, Mass.

Francujo: Kiu dez. interŝ. desegn. de 4 j. infanoj. Fino Hachin Ecole Pasteur Cd. Quevilly S. I.

Germanujo: Hans Schöwe Staufenstr. 2 14 b. Schweningen a. N. dez.
kor.

La Edama lernejo interŝanĝos ĉiun kvanton da poŝtmarkoj.
Adreso: C. Geurts, lernejestro, Edamo.

Por la instruistoj.

En „Klerigo“, organo de la Aŭstralia Esperanto Societo de instruistoj, kiu celas disvastigi esperanton tra la lernejoj, ni trovis la sekvontan artikolon, kiu parolas por si mem:

Pri la interlernejaj interŝanĝoj.

Tio estas grava afero al kiu ni ĉiuj devus atenti. Dum multaj jaroj grupo de esperantistoj-instruistoj en Francujo, kaj depost la lasta mondmilito en kelkaj aliaj landoj diversaj instruistoj, eksperimentis rilate al internacia korespondado inter la lernantoj. El tiuj eksperimentoj evidentiĝas du faktoj. Unue, ĉiu spertis ke la infanoj mem ne daŭre korespondadas sen la helpo de siaj instruistoj. Ili skribas malmultajn vortojn pri si mem, pri siaj gepatroj, pri siaj pupoj kaj pri la kato. Poste ili prokrastas skribi ĝis fine mortas la korespondado. Tia korespondado malmulte valoras. Efektive ĝi povas malhelpi al la grava celo, la fondado de internaciaj amikecoj.

Aliflanke korespondado inter lernejoj kaj grupoj de infanoj povas havi tre grandan valoron. Sub la gvidado de siaj instruistoj la infanoj skribas pri aferoj en sia propra lando kiuj interesas la infanojn de aliaj landoj. Ekzemple la infanoj en Aŭstralio skribas pri siaj birdoj, kiuj estas malsamaj al tiuj de aliaj landoj, pri kanguruoj, ornitorinkoj, koaloj, ktp. Ili povas skribi pri vastaj ŝaf-bienoj, vastaj tritik-kampoj ktp, kiuj vere surprizas la infanojn en la pli dense loĝataj landoj.

Per tiuj skriboj la infanoj mem povas lerni pri sia propra lando. La interŝanĝoj povas kunligiĝi kun la ordinaraĵ lecionoj. Ni studas pri nia propra lando. Bone! Ni sendos niajn notojn al niaj transmaraj amikoj. Ni studas pri aliaj landoj. De-nove bone! Ni ricevos informojn rekte de la infanoj de tiuj landoj.

Estas grave ke la infanoj mem skribu eĉ se la instruisto devas traduki la tekstojn. Tiamaniere ili alkutimiĝos al internacia kunlaborado. Ne estas ke ili nur korespondas kun aliaj. Ili vere helpas unu al la alia fari la ordinaraĵ lecionojn pli interesaj. Tio estas la vera bazo de sukceso — KUNLABORADO. Kompreneble la infanoj mem povas interŝanĝi poŝtmarkojn, bildojn, sekigitajn florojn, ktp. Sed estas fakto ke ili kunlaboradas kio firmigas la bazon de vera internacia konscio.

Iom post iom progresis la movado de la presarto en la lernejo.

Jam multe da lernejoj aŭdis la alvokon de amiko Lentaigne el Francujo.

Sed ni vivas rapide, la sekvonta paŝo jam estas metita. Monda Garbo aperis. Sino. Monier, instruistino, Ecole Paul Doumer, kolektis la plej belajn, la plej bonajn verketojn el la internaciaj lernejoj gazetoj kaj tiamaniere naskiĝis nova gazeto mempresita.

Ni kaj vi faru la sekvantan paŝon!!

La belaspekta presita gazeto de infanoj por infanoj. Jen la provo!

Ni jam posedas pli ol 1000 abonantojn, infanojn kaj instruistojn. Ankoraŭ mankas multaj instruistoj, kiuj instruas nian lingvon al siaj ĝelernantoj. Ankoraŭ mankas multaj infanoj, kiuj lernas esperanton de siaj instruistoj!!

Nia celo:

Simple infangazeto, internacia Garbo, de infanoj por infanoj.

Sendu al ni vian opinion!!

Adreso: C. Geurts, lernejestro, Edam, Nederlando.